

# Unuo 5

## **Datumbaza sistemo por esperantistoj universitatoj**

Ekzistas kelkaj datumbazoj de esperantistoj universitatoj. Certe okazas la komuna problemo pri la manko de partopreno, kiu faciligas ke la datumbazoj neniam estas kompletaj, neniam tute bone reprezentas la realon. Tia problemo havas malfacilan solvon, kvankam oni bone farus se ne akceptus la malplenan rezulton kaj klopodus bone reprezenti la realon.

Kiu estas la utileco de tiuj datumbazoj?

### **Realo kaj ebloj**

En la universitato ekzistas, minimume teorie, klara sinteno de kunlaboro, internacieco kaj interfakeco. La kerno sur kiu universitatoj konstruas tian kunlaboron estas projekto pri esplorado, kiu rilatas a la sama scivolemo; aŭ projekto pri instrua aŭ docenta komuna intereso. Do, datumbazo estus utila se universitatoj partoprenantoj povus uzi ĝin por:

1. Scii pri kiuj kolegoj
  1. Instruas pri la sama temo.
  2. Scivolemas pri la sama esplora afero.
  3. Interesas pri la sama flanko el la universitato.
2. Sukcese kontaktiĝi kun ili.
3. Sukcese havi manieron/sistemon/rimedon por aranĝi rendevuon aŭ komunan virtualan spacon por eklabori.

Kutime la datumbazoj enhavas informon pri nomo, fako kaj universitato. Tio utilas por kalkuli kiom da universitataj instruistoj esperantiĝis kaj rilatigi tiun informon kun fakoj aŭ disciplinoj. Se la datumbazo havas ankaŭ retadreson, oni eĉ povas klopodi kontaktiĝojn. Sed, tia sistemo sufiĉe plibonigblas.

### **Propono**

La propono estas duobla. Unuflanke temas pri pligrandigo de la variablaro. Aliflanke, pri aldono de simpla sed efektiva helposistemo por faciligi kontaktiĝojn kaj kunlaborojn.

### *Enhavo de la datumbazo*

Eble la plej bona ĝis nun estas la datumbazo enhavita en la projekto kunagade.org. Tamen oni povas pensi pri enhavo kiu konsistu el minimuma informo (por ne ĝeni la plej okupiĝataj homoj) sed tute necesa por la menciitaj celoj. La propono devas esti disvastigata kaj diskutata antaŭ ol akcepti ĝin kiel finan.

1. Kiu: 1. Persona nomo, 2. Familia nomo
2. Kie: 3. Universitato aŭ simila, 4. Konkretaĵo: fakultato aŭ esplora centro aŭ instituto aŭ departemento aŭ simila, kiu estas pli konkreta ol la Universitato. 5. Lando
3. E-e: La variabloj 6-9 havas la saman informon kiel 1-4 sed skribita laŭ la Esperanta prononco. La lando

jam estas skribita Esperante kaj oni povas elekti ĝin de malfaldebla listo. 10. Esperanta nomo.

4. Fako: 11. Disciplino (psikologio, matematiko...). 12. Instrua specialiĝo laŭ la UNESCO-sistemo. 13. Esplora specialiĝo, laŭ la sama sistemo. Oni povas elekti pli ol unu kodon.
5. Intereso: 14. Listo da vortoj aŭ esprimoj, kiuj reprezentas tion pri kio oni spertas, nuntempe laboras aŭ havas intereson. Oni rekte skribas ilin, kvankam la sistemo faciligas kompletigi vortojn aŭ esprimojn, kiujn ĝi jam havas en la datumbazo.
6. Kontakto: 15. Retadreso, 16. Aliaj metodoj (aliaj retadresoj, poŝtelefona numero, poŝta adreso ktp, laŭ libera formato).
7. Persona informo: 17. Libera campo kien oni metas personan retpaĝon, personan blogon, paĝon de utilaĵoj kiel ORCID aŭ similaj. 18. Alia informo pri kiu oni deziras aldoni klarigojn, avertojn, anoncojn, metodojn por io ktp.

### *Helposistemo*

Kiam iu eniras en la retpaĝo kaj plenumas la demandaron per bona facila sistemo, samtempe tiu homo akiras la rajton konsulti la datumbazon. Tio ne okazas rekte sed per specifa ilo, kiu ne nur estas konsultilo, sed ankaŭ faciligilo por atingi de kontaktoj kaj eklaboro. Ekzemple, oni povas rekte uzi la retadreson, kiun donas la sistemon, aŭ plibone uzi specifan demandaron, kiu enhavas la kernajn kampojn: kiu skribas (la sistemo montros al ricevanto la profilon de la skribanto), al kiu sendas kaj kion deziras. La sistemo permesas grupan sendon, nome mesaĝon sendita al ĉiu homo de konkreta fako, loko, specialiĝo ktp. Ideale, la retpaĝo enhavas kalendaron, kiu adaptiĝas al horara sistemo en ĉiu lando, tiel ke ĉiu uzanto elektas horojn (ekzemple por proponi renkontiĝon aŭ informi pri kiam okazos io), kiuj oni rigardas laŭ la propra landa horsistemo.

### **Procezo**

Unue oni devas havi retan spacon kaj eblojn por bone programi datumbazon, kiel php+mysql. Samtempe, la dezajno devus esti disvastigata por atingi proponojn pri eblaj plibonigaĵoj. Due, okazas la finfina dezajno kaj programo, la pruvo de la rezulto kaj la unuaj uzoj.

Multaj esperantistoj kutime ne partoprenas en tiaj aferoj. Okazas ankaŭ, ke la universitatoj kutime havas tempon por nenio. Do, gravas havi *ĉefan kontakton* en ĉiu universitato, kiu respondecos pri la aliaj esperantistoj kiuj ankaŭ laboras en la sama loko.

La sistemo povas senhalte esti plibonigata. Ekzemple, kiam alvenas nova partoprenanto, ĉiuj kiuj havas komunan fakon, lokon, intereson... ricevas novaĵon en sia retadreso, sendita de la sistemo, kun ligilo al nova profilo.